

Nia prelegvojaĝo en Britio por SATEB
Radioprelego de Claude GACOND, SRI 454, 1972.06.21 & 24

Cl.- Parolas Claude Gacond.

De la 12-a ĝis la 30-a de aprilo mi estis kun mia edzino la gastoj de SATEB en la celo de prelegvojaĝo en Britio. La mallongigo SATEB signifas Sennacieca Asocio Tutmonda en Britio.

Ni prelegis en pluraj urboj de Britio, kaj okaze de ĉiu prelego ni havis la okazon renkonti esperantistojn, kiuj estas aŭskultantoj de niaj elsendoj. Kaj ni sentis, ke inter ni kaj ili ekzistas profunda amikeco. De nun, kiam ni radio-prelegas, ni vidas antaŭ ni la kapojn de tiuj britaj samideanoj, kiujn ni havis la ĝojon kaj honoron renkonti, kaj kiuj kelkfoje veturis multajn kilometrojn por ĉeesti unu el niaj prelegoj.

Se hodiaŭ mia edzino ne dialogas kun mi, tio ne signifas, ke tiu prelegvojaĝo eluzis ŝiajn fortojn. Kiel vi aŭdis alian semajnon, okazis de la 6-a ĝis la 12-a de majo grava kongreso en Lugano, kun ĉeesto de pli ol 600 esperantistoj el 18 landoj. En tiu urbo Lugano mi registris tiun ĉi hodiaŭan elsendon, dum mia edzino deĵoris en la libro-vendejo. Dum la aliaj semajnoj ni raportis pri la laboro, kiu efektiviĝis en tiu 24-a IFEF-kongreso kaj aŭdigis al vi la voĉojn de diversnaciaj kongresanoj. Hodiaŭ ni ŝatus fari mallongan raporton pri nia restado en Britio.

Ni alvenis aviadile la 12-an de aprilo, kaj ni estis akceptitaj de sinjoro Prent, la prezidanto de SATEB. Lia domo en Ilford, kvartalo de Londono, fariĝis nia ĉefloĝejo. Sinjoro Prent plenumas tre utilan funkcion. Estas li, kiu dissendas en la tutan mondon la *Plenan Ilustritan Vortaron de Esperanto*. Ni vizitis lian labor-ĉambron, kaj ni admiris lian racian labor-metodon, kaj ni konstatis, ke tiu multekosta vortarego rapide forvendiĝas. Pli ol la duono estas jam disvendita.

Estas sinjorino Prent, la sekretariino de SATEB, kiu organizis nian vojaĝon. Dum preskaŭ tri semajnoj ni prelegis en esperanto-grupoj, lernejoj kaj societoj, kaj nia vojaĝo estis tiel bone planita, ke ĉe ĉiu stacidomo, kie ni devis halti, esperantisto nin atendis, en ĉiu urbo, kie ni devis restadi, samideanoj nin gastigis. Tiel ni eniris en dekon da hejmoj. Kvankam ni nur parolis esperanton, ni tiel vere intimiĝis kun la brita vivmaniero. Plej ofte tiuj hejmoj estas duetaĝaj dometoj. Stratflanke troviĝas enirĝardeneto kun belaj floroj kaj razeno. Ĉe la alia flanko troviĝas tre mallarĝa, sed ofte sufiĉe longa legom- kaj restad-ĝardeno. La britaj urboj, pro tiu multiĝo de la dometoj, estas vastegaj, sed samtempe, kiam vi fine atingas vian hejmon, vi ĝuas pri la trankvilo, kiun kreas tiu konstrumetodo.

Unue ni veturis al la nordo. En la urbo Halifax ni prononcis nian unuan prelegon antaŭ trideko da esperantistoj. Inter ili ni trovis gesinjorojn Najbaro, kiuj tutcerte estas niaj plej fidelaj aŭskultantoj. Dum la unua semajnfino ni partoprenis la jarkunvenon de SATEB, kiu disvolviĝis en bela palaco ĉirkaŭita de grandega angla ĝardeno. Tiu bieno Wortley Hill, kiu situas proksime de Sheffield, estas ideala preleg-loko. Tie ni prononcis du paroladojn.

Fakte ni havis tri prelegtemojn. Ni kunportis grandajn fotojn pri Edmond Privat kaj prezentis paroladon pri la temo *Renkonto kun Edmond Privat*. Ni kunportis diapozitivon pri nia lando por prelego titolita *La etapoj de la svisa federalismo*. La tria temo estis pli faka: *Situo de esperanto inter la planlingvoj*. Ni konstatis, ke tiuj tri prelegoj vekis multe da intereso.

Bedaŭrinde la horoj rapide forflugas, kaj plurfoje geaŭdantoj esprimis la deziron povi longe diskuti pri la tuŝitaj temoj.

Okaze de nia reveno al Londono la aŭtomobilo en kiu veturis gesinjoroj Prent, niaj gastigantoj, havis akcidenton, kaj sinjorino Prent kuŝis pli ol unu semajnon en la hospitalo kun 5 ripoj rompitaĵ. Kun ŝi ni tre bedaŭris tiun malagrablan kaj dolorigan eventon, sed samtempe ni estis kontentaj, ke la akcidento ne havis pli gravajn konsekvencojn. Ni esprimas al ŝi kaj al la aliaj etvunditoj niajn resanigajn bondezirojn.

Fraŭlino Helena Prent, kiu loĝas en alia kvartalo de Londono, venis anstataŭi sian patrinon por la organizo de nia vojaĝo. Tiel ĉio povis plenumiĝi kiel eble plej akurate. Ni forlasis Londonon por prelegi en orienta Britio en Ipswich kaj en okcidenta Britio en Bristol. Tie ni estis gastigataj de gesinjoroj Cattling-Brun. Ni bone konis sinjorinon Sonja Cattling-Brun, kiu estas svisdevena. Kun sia edzo ŝi parolas esperanton, kaj kun siaj du filinoj la germanan. La edzo parolas angle al la filinoj. Estas vere poliglota familio. En Bristol ni konatiĝis kun sinjoro John Palmer, la gajninto de la esperanto-konkurso ĉe Radio-Svislando. Li afable invitis nin tagmanĝi en sia hotelo. Alian semajnon ni diris kelkajn vortojn pri la laboro, kiun li plenumas favore al kroata fervojista gazeto.

En Londono ni vizitis la Oficejon de Brita Esperanto-Asocio. Tie ni registris intervjueton kun sinjoro Schilperoord, kiu iniciatas la kreon de labor-grupo, kiu nomiĝas Grupo Kvin.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis Claude Gacond. Ĝis reaŭdo!